


Esperanto
V-19479/40

(1971)

Bulgara **ESPERANTISTO**



E N H A V O

Nikola Aleksiev. Panoramo de la Esperanto-movado	1
Blaga Dimitrova. Infano de la tero. Tradukis As. Grigorov	3
Elena Popova. Agresantoj, haltigu la militon!	3
Miĥail Ŝekerĝiev. Maria	3
Emil Ĉirpanski. Flamo el la fajrero	6
Lernanta E-grupo de „Fajrero“ en Dospat.	7
Bojka Batalska. Sesa Nacia Studenta E-Konferenco	7
Arturs Kubulnieks. Amikeco inter latvaj kaj bulgaraj espe- rantistoj	7
I. S. Esperanto en USSR	8
N. Andrianova. Esperanto-novaĵoj el Ukrainio	8
Radietanoj. Letero el Latvio	9
Stojan Kostadinov. Dua Nacia Renkontiĝo de rumanaj espe- rantistoj	10
* * * Regularo de la Koresponda Servo de TEJO	10
Nikolaj Pârvanov. Renkontiĝo en Vsetin, Ĉeĥoslovakio . .	11
Kunĉo Vâlev. Kalocsay-kunvenoj en Sofio	11
Kolomano Kolocsay. Kion fari por la Esperanta literaturo .	12
Petro Stojanov. Ĉe la maljuna brigadestro	15
Ĝorĝeta Zdraveva. Pupteatra Internacia Festivalo en Zagreb	16
* * * Oficiala komuniko de la Akademio	17
* * * Deziras korespondi	18

Sur la kovripaĝo :

*Junaj esperantistoj el Dospat kun sia gvidanto
Emil Ĉirpanski (vidu p. 6)*

*Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv.,
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv.
Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“ (Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco
Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Sep-
tembrie 65, Bukuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika,
D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva M—449.

SVEDIO: Karl K. vist, Deje, Box 109.



PANORAMO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN BULGARIO*

Dum 1971 la bulgaraj esperantistoj atingis novajn sukcesojn.

En multaj urboj kaj vilaĝoj estis organizitaj kursoj de Esperanto por lernantoj kaj civitanoj precipe el inter fakuloj. En la Superan Pedagogian Instituton de Ŝumen Esperanto estis enkondukita kiel fakultativa studobjekto. Tio estas la kvara supera lernejo en nia lando, kie oni instruas fakultative la Internacian Lingvon.

La Distrikta Komitato de Bulgara E-Asocio en Smoljan organizis la Kvarajn Internaciajn E-Kursojn.

Sub la egido de la Instruista Sekcio de BEA plene sukcesis la porinstruistaj E-kursoj en Burgas. Inter la instruantoj tie estis ankaŭ d-ro Szerdahelyi (Serdahelj), estro de la Esperanto-katedro el la Budapeŝta Universitato, kaj Helmut Sonnabend (Zonaben) el Germana Federacia Respubliko, vicprezidanto de la Internacia Ligo de Instruistoj-Esperantistoj (ILEI).

Estis eldonitaj lernolibro de Esperanto por progresintoj de Henrik Sepik kaj metodika gvidlibro de d-ro Szerdahelyi. Je nuntempa scienca kaj metodika nivelo estis ellaborita programo por instruado de Esperanto en la lernejoj laŭ la postuloj de Ministerio de Popola Instruado. Laŭ tiuj postuloj speciala aŭtora kolekto preparos ankaŭ lernolibron por junpioniroj.

En urbo Jambol okazis la Deko Nacia Festivalo de Junaj Esperantistoj, dediĉita al la Deko Kongreso de Bulgara Komunista Partio. Konkursis por plej altaj atingaĵoj pli ol mil junaj amatoroj el ĉiuj ĝenroj de la belarto. La festivalo basis je alta politika kaj arta nivelo kaj estis vera festo por la Esperanto-junularo el la tuta lando. Speciale entuziasma estis la militingo kune kun la junularo de Jambol, dediĉita al la junulara batalo kontraŭ la imperiismo.

En la historia urbo Karlovo estis organizita internacia junulara Esperanto-seminario je temo „La ideologio de Vasil Levski, la verkaro de Hristo Botev kaj Ivan Vazov“. Prof. Ivan Unĝiev kaj la literatoro-esperantisto Asen Grigorov kompetente kaj interese priskribis la aferon de l'titanoj de niaj naciaj Renesanco kaj literaturo Levski, Botev kaj Vazov. Oni vizitis iliajn naskiĝdomojn transformiĝintajn en muzeojn-sanktejojn por nia popolo.

En la ĉefurbo okazis granda publika kunveno helpe al la popoloj de Hindoĉinio kaj defende al la juna amerika patriotino Angela Davis. Ĝi estis organizita de la bulgara sekcio de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), la Nacia Komitato por Defendo de la Paco kaj la Urba Komitato de Patrolanda Fronto.

La CK de BEA kunvokis du plenkunsidojn, kiuj fiksis la taskojn de la

* Parolado, farita de la prezidanto de BEA Nikola Aleksiev antaŭ Radio Sofia lige kun la Nova 1972.

esperantistoj lige kun la decidoj de la Deko Kongreso de BKP. Tio donis pli grandan klarecon kaj novan puŝon en la preparo de la 38-a Nacia Esperanto-Kongreso, kiu okazos komence de julio 1972 en urbo Smoljan.

Vigla estis la agado de la bulgaraj esperantistoj ankaŭ sur la internacia Esperanto-areno.

Sufiĉe granda grupo de bulgaraj esperantistoj partoprenis la laboron de la 56-a Universala Kongreso de Esperanto en Londono. Aparte fortan impreson lasis ĉe la esperantistoj el la kvin kontinentoj la altnivela ludo de la Bulgara Esperanto-Teatro, konsistanta el artistoj el la Nacia, Junulara kaj Satira Teatroj.

Niaj junaj esperantistoj partoprenis la kongreson de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo (TEJO) en Edinburgo, Skotlando.

La bulgaraj esperantistoj estis invititaj kaj partoprenis E-konferencon en Ĉeĥoslovakio kaj Rumanio, ankaŭ la renkontiĝon de reprezentantoj de la E-movadoj en Berlino, GDR.

En la MEM-kunveno en Londono bulgaraj esperantistoj ludis aktivan kaj gvidan rolon.

Niaj reprezentantoj partoprenis la kongreson de la Internacia Federacio de Esperantistoj Fervojistoj en urbo Maribor, Jugoslavio, ankaŭ la regionan Konferencon de Instruistoj-Esperantistoj el la Balkan-Danuba kaj Adriatika Basenoj en la sama urbo.

En la Asembleo de la Tutmonda Packonsilantaro, okazinta en Buda-peŝto, partoprenis ankaŭ reprezentanto de MEM el Bulgario, kiu estis elektita en la Tutmonda Packonsilantaro. Tio estas granda atento de la tutmonda movado de pacbatalantoj al la agado de MEM kaj de la bulgara E-movado.

Ni notis nur kelkajn el la plej gravaj manifestiĝoj de la bulgaraj esperantistoj en 1971. Ili estas valora kontribuo al la disvolviĝo de la bulgara kaj internacia Esperanto-movado kaj garantio por sukcesa 38-a Nacia Kongreso de la Esperantistoj en Smoljan.

La prezidanto de la Komitato pri Arto kaj Kulturo k-do Pavel Matev kaj la prezidanto de la Komitato pri Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando k-do Georgi Dimitrov — Goŝkin ricevis la jenan leteron:

La 18-an de novembro 1971

Estimata Sinjoro Prezidanto,

En la nomo de la centraj organoj de Universala Esperanto-Asocio, kaj nome de pli ol 2000 partoprenintoj el 43 landoj en la 56-a Universala Kongreso de Esperanto, Londono, Britujo 1971, ni esprimas al vi nian plej sinceran dankon pro via subteno kaj apogo al la Bulgara Esperanto-Teatro el Sofio, kiun ĝi ricevis de via Komitato.

La Bulgara Esperanto-Teatro sub la gvido de Kiril Draŝev kaj en konsisto de plej eminentaj kaj ŝtate merititaj aktoroj denote montris sian majstrecon. Post Vieno en 1970, ankaŭ ĉi-jare en Londono la kolektivo de bulgaraj geaktoroj brile manifestis antaŭ la ekstera mondo la atingojn de la bulgara realisma teatra arto. La surscenigo de „Mandragoro“ de Makjaveli en la akademia teatro de University College London elvokis grandan atenton kaj rikoltis merititan laŭdon de la internacia esperantista publiko. Pri la alta nivelo de la prezentadoj juĝis diversaj fakuloj. Favorajn opiniojn donis ankaŭ la gazetaro. La kontribuo de la Bulgara Esperanto-Teatro al la programo de la 56-a Universala Kongreso pozitive kunlaboris al la interŝanĝo de kulturaj valoroj kaj tiel vastigis la kadron de internacia amikeco pere de la Internacia Lingvo Esperanto.

Kun la espero kontinui la tradicion de la Bulgara Esperanto-Teatro ĉe la Universala Kongresoj en venontaj jaroj, ni esprimas al vi nian estimon kaj respekton.

Por la Universala Esperanto-Asocio

D-ro Victor Sadler
Direktoro de Centra Oficejo

Mikulaŝ Nevan
Konstanta Kongresa Sekretario



INFANO DE LA TERO *

de Blaga Dimitrova

Infano naskiĝinta sub la tero.
Kaŝejo lia estas lia hejmo, lia mondo.
Neniam vidis li la sunon kaj la florojn.
Vizaĝo lia estas terkolora.
L' okuloj larmas kaj doloras
pro lumo eĉ de lanterneto.
Por li la tero estas balancanta sin lulilo,

kaj dormokant' — la tondro de la bomboj.
Por li la tero estas tablo kaj fenestro,
por li la tero estas firmamento nigra.
Al li la tero servas ankaŭ por ludilo.
Ankoraŭ ne kreskinte granda, iĝos li soldato
kaj kovros per la brusto tiun teron.

El la bulgara: *Asen Grigorov*

AGRESANTOJ, HALTIGU LA MILITON!

de Elena Popova

Gasto en mia lando
estis soldato neordinara:
vjetnama knabo 13-jara!
La knabo-soldato estis 6 fojojn
vundita.

Li devis iri en sciencan vojon,
sed estis punita
de gastoj neinvititaj
esti malklerulo!
Li devis ludi senĉese, libere,
kreski belulo,
sed anstataŭ tio
li devis preni armilon.
Kaj malgranda ankoraŭ,

li estiĝis heroo!
Patrinoj de la tuta tero,
ni faru sinklinon!
Multe da tiaj idoj en tiu horo,
defendas la liberon!
Patrinoj, leviĝu! Haltigu
la morton furiozantan
en lia lando suna!
Leviĝu, por ke la vivo-kanto
venu al la koro juna!
Agresantoj, haltigu la militon!
Revenu vi, uson-soldatoj,
ne havas vi inviton!

* La versaĵojn „Infano de la tero“ kaj „Agresantoj, haltigu la militon!“ ni represas el „Informado el Vjetnamio“ — kvaronjara organo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, n-ro 3/1971.

MARIA*

de Mihail Ŝekerĝiev

„Saŝo, ĉu ne, la homoj similas riverojn?“ — demandis min Maria, observante la preterpasantan montaran rivereton. Ŝi silentis momenton kaj daŭrigis: „Nu, aŭskultu, kiel dolĉe murmuras la akvo, kvazaŭ rakontas fabelon.“

* La rakonto „Maria“ de nia s-ano M. Ŝekerĝiev ricevis la trian premion en la branĉo originala prozo en la Belartaj Konkursoj de UEA (1968 j.). Unuafoje ĝi estis publikita en „Esperanto“, n-ro 11/1971, de kie ni prenas ĝin (kun la foto).

Mi ĵetis rapidan rigardon al la rivereton vigle saltanta de ŝtono al ŝtono formante dekojn da etaj akvofaloj. Sed mi ne respondis tuj. Ŝajnis al mi, ke Maria fantazias, ke ŝia komparo estas stranga kaj neperceptebla. Tamen ne volante kontraŭstari ŝin, mi flustris: „Jes, kara, la homoj similas riverojn.“

Kiam la vesperon mi enlitiĝis, la impresoj de la belega ekskurso longe okupis mian atenton. Maria, mia revo, estis tiel milda kaj babilema kun mi! Malgraŭ tio, mi ankoraŭ dubis, ĉu ŝi vere amas min. Poste la penso pri la

riveroj ree aperis antaŭ mi. Mi komencis riproĉi min, ke hodiaŭ mi ne estis sincera, ke nur pro komplezo mi respondis: „Jes, Maria, la homoj similas riverojn.“ Kia simileco fakte povus ekzisti inter ili?

Kun Maria mi interkonatiĝis antaŭ ses monatoj. Ni vagis kune en la montaroj, vizitadis teatrojn, koncertojn, amuzvesperojn, sed fakte mi ankoraŭ ne konis ŝin bone. Mi komprenis nur, ke ŝi estas mirinda estaĵo. Ŝi ŝatis muzikon, poezion, pentrarton, serĉis kaj ĝuis la belecon tie, kie ni ordinare ne rimarkas ĝin. Tiu ĉi virino, juna kaj bonkora, estis elkreskinta en montara urbeto. La daŭra kontakto kun la naturo donis al ŝi tre senteman animon. Ofte ŝi ascendis la montopintojn kaj de sur ili renkontis la sunon. Pro tio oni nomis ŝin aglino. Ŝi ŝatis la florojn, la bestojn, la infanojn. Kaptinte kokcineleon, ŝi ĝuis ĝiajn nigrajn makuletojn kaj, satiginte, lasis ĝin flugi for kun bondeziroj. En ŝia animo estis io primitiva kaj alloga. En kiu senco ŝi povus pravi pri la riveroj?

La morgaŭan tagon mi telefonis al Maria kaj ni interkonsentis rendevuon.

„Ĉu ni iros danci ĉi-vespere?“ — ŝi demandis ĉe la renkonto.

„Ne, Maria, ĉi-vespere ni filozofios. Mi deziras, ke vi klarigu al mi vian komprenon pri la riveroj,“ — mi respondis, kiam ni sidiĝis sur benko en la parko.

„Bone, mi ankaŭ ŝatas la filozofiajn temojn,“ — konsentis tuj Maria.

Poste, preninte mian manon, ŝi eksilentis, kvazaŭ ŝi volus koncentri sian atenton, kaj komencis:

„Unue, Saŝo, mi parolos pri la naturo, pri ĝia beleco, harmonio, dinamiko, ritmo. Tiel vi komprenos min pli facile. La okuloj, la animo kaj la konscio de la homoj perceptas la belecon ĉie. La najtingalaj triloj ĝojigas nin, la ĉielarko karesas nian estetikan senton, la belaj, ofte mirindaj formoj de floroj aŭ bestoj igas nin admiri kaj

interjekcii. Ĉu la pufiĝanta pavo konscias la belecon de siaj imponaj plumoj aŭ la skarlataj kaj violetaj koraloj, marsteloj kaj strikoloraj fiŝoj scias, kian emociion ili naskos en la animo de la subakvaj esplorantoj?

Ni diru, ke vi estas kolektanto de papilioj. Kio igis vin kolekti ĝuste papiliojn? Sendube via intima ideo estis ĝui ilian belecon, ĝui la malavare disĵetitajn diversformajn, molajn, pitoreskajn kolormakulojn. Ĉu vi ne konsentus kun mi, ke la reto de la araneo estas same delikata belaĵo? Mi ne dubas, ke dum frostaj vintraj frumatenoj vi ofte ĝuis la glaciflorojn mistere aperintajn sur viaj fenestrovitroj.“

Ne volante interrompi ŝiajn pensojn, mi silentis. Mia menso soife sorbis ĉiun vorton. Kion mi povus kontraŭdiri? Maria daŭrigis:

„Vasta kaj ampleksa estas la diapazono de la naturbeleco. La kuracistoj longe esploris la homan korpon kaj admiris tiun mirindan maŝinon. Ne, mi ne rajtas diri maŝinon. Ĉu la belstaturo torso de Venuso de Milos aŭ de similaj belegaj virinoj estas maŝino?! La homa korpo estas vera belaĵo kaj mirindaĵo.

Sed la naturbeleco konsistas ne nur el koloroj kaj formoj. Ĝia karakteriza indiko estas ankaŭ la dinamiko. Tium dinamikon oni sentas en la akvofaloj kun la miradoj da vaporigantaj akvogutoj, en la senĉese vagantaj nuboj, en la ŝtormoj kaj fulmotondroj, en la maturiĝo de la vino, en la atako de la mikroboj. La ventoj blovas, la steloj cirkulas, la atomoj bolas. Ĉie estas dinamiko. Sen ĝi ekregus morto.“

„Rakontu ion pri la harmonio, Maria“ — mi interrompis ŝin.

Tute fascinite, ĉi-vespere mi sentis, kiel pli kaj pli Maria kreskas spirite antaŭ miaj okuloj. Same verve kaj emociplene ŝi daŭrigis:

„Observante la naturvivon, oni facile konstatas, ke en ĝiaj aperaĵoj ekzistas ankaŭ harmonio. Nokte mi observas la stelojn senkolizie flugantajn en



la kosmo; haltinte antaŭ formikejo, mi rigardas, kiel ne malhelpante unu la alian, la formikoj laboras laŭ neskribitaj leĝoj. La kristaloj kristaliĝas bele kaj simetrie, la abeloj arkitektmajstre konstruas sian ĉelaron, ĉiu muziknoto havas sian ĝuste difinitan lokon en la diversaj gamoj, melodioj kaj agordoj. Leĝoj, naturaj leĝoj, simplaj kaj saĝaj.

Kaj la ritmo? La ventoj, kreitaj pro influo de la suno sur la tero, la tajdo, kiu altiĝas kaj malaltiĝas sub la influo de la luno, la tagoj, sekvataj de la noktoj, ĉiuj ĉi estas subigitaj al la leĝo de la ritmo. Ritmo estas en la poezio, ritmo estas en la muziko, ritme sin movas la pendolo, ritme spiras ni ĉiuj. En nia ĉiutaga vivo ni ĉiam devas kompari nin kun la naturo, ĉar ni estas eroj de ĝi. Ĉiu homo devas porti en si la belecon, la dinamikon, la harmonion kaj la ritmon de la naturo.

„Belege, belege! — mi interjekciis. Kaj en la sama tempo mi pensis: „Ĉu tiu ĉi virino kun simila tenera animo estas tiu sama inĝenierino, kiu kaptas kaj bridadas riverojn en baradoj, estras laboristojn kaj sentas sin egalrajto kaj egalvalora kun la viroj?“

„Tamen ĉu vi kredas, ke la civilizacio tiom multe progresis, por ke ni povu diri, ke inter la homoj regas har-

monio? Ne! Ankoraŭ milionoj da homoj sur nia terglobo vivas en malklereco kaj mizero, mortas pro malsato kaj pro teruraj malsanoj. Aliflanke, la homaro sin malproksimigis multe de la naturo, kaj pro tio sia peko ricevas punon en formo de degradiĝo kaj anticipa morto.“

„Sed, Maria, la naturleĝoj ne estas la samaj, kiuj regas en la homa socio“ — mi diris.

„Oni ja ne povas ĝuste imiti la naturleĝojn, sed oni povas efektive krei kondiĉojn egale necesajn por ĉiuj homoj, por ke ili vivu laŭnature kaj feliĉe.“

Senpacience mi atendis la momenton, kiam ŝi komencos klarigi sian originalan penson pri la riveroj. Post eta paŭzo ŝi komencis:

„Mia hieraŭa eldiro pri la riveroj estas bazita sur la sama koncepto. Nia vivo, Saŝo, estas multjara vojaĝo. Vojaĝo simila al la vojaĝo de la riveroj, trankvila aŭ plena de dinamiko, utila aŭ senkolora, vana. Tiurilate ĉiu homa vivo estas unu rivero. Ekzistas homoj senvolaj kaj apatiaj, kiuj similas trankvilajn riverojn, kun kanoj kaj akvofolioj. Ofte kelkaj arbotrunkoj estas falintaj en ilian akvon, tamen tiuj riveroj ne protestas, ne forpuŝas kaj ne forportas la trunkojn, sed rezigne kaj

„Tiu vespero kunigis nin por ĉiam...“

(Foto: d-ro Szilveszter, Hungario)



kvierte preterfluas ilin. Aliaj homoj, en kiuj regas pasioj kaj malvirtoj, similas riverojn, kiuj eliĝis el siaj litoj, detruas bordojn, domojn, mortigas bestojn, faras sulkojn sur la ebenaĵoj. Ĉu la sulkoj sub la okuloj kaj ĉe la anguloj de la lipoj kaj en la animo mem ne estas ofte rezultoj de furiozintaj pasioj kaj malvirtoj? Ekzistas ankaŭ homoj similantaj nek la detruantajn riverojn, nek la kvietajn. Ili estas entuziasmoplenaj, viglaj, iliaj sentoj kaj intelekto kontrolas sin reciproke. Ili sentas en si la kanton de la vivo, la kanton de la naturo. Ili alportas ĝojon, plezuron. Ili si-

milas printempajn torentojn. La riveroj trafluas montojn kaj kampojn, batalas kontraŭ rokoj, akceptas dekojn da riverbranĉoj kaj fine enfluas la marojn kaj oceanojn. Ilia akvo, komencinta sian vojon de la fonto, ne ekzistas plu. Ĝin sekvas nova. En sia vivo la homoj laboras, batalas, ĝojas, amas kaj malamas, kaj lacaj kaj maljunaj atingas la morton“.

Maria finis.

Mi ĉirkaŭprenis ŝin kaj arde kisis ŝin. Ŝi ne protestis. Estis jam malfrue. Tiu vespero kunigis nin por ĉiam, kaj ni ekfluis kiel du riveroj al la oceano.

ORGANIZA VIVO

FLAMO EL LA FAJRERO

Dospat, la 18 de novembro 1971. En la klubo de Komsomolo kolektiĝas esperantistoj de diversaj aĝoj. Plej multnombraj kaj plej ĝojaj estas la plej junaj — la lernantoj de la mezlernejo. Komenciĝas la raporto. Tio estas la unua jara kunveno de E-Societo „Fajrero“ post ĝia fondiĝo je la 10. II. 1970. El la raporto estas videble, ke dum la pasinta jaro la fajrero de Esperanto ĉi tie fariĝis jam flamo. Ĝis antaŭ du jaroj neniu en Dospat parolis pri Esperanto, verŝajne neniu sciis pri ĝi, sed nun estas alie. Hodiaŭ en la mezlernejo „Dimitr Blagoev“ estas 46 esperantistoj-lernantoj. La nova Esperanto-klaso nombras 31 lernantojn. Funkcias E-kurso por instruistoj kaj junuloj. El la raporto estas videble ankaŭ, ke plej multe laboris por Esperanto la lernantoj. Ili preparis bonegan programon por la E-festivalo en Smoljan, havas tre viglan E-korespondadon k. a. Ĝis nun ili ricevis pli ol 60 leterojn el diversaj landoj de la mondo. Membroj de nia societo partoprenis internaciajn aranĝojn en diversaj landoj. La printempa E-balo en Dospat, la ekskursoj kaj la partopreno en diversaj renkontiĝoj de la esperantistoj estas gravaj momentoj en la vigla agado de la societo.

Ĉiuj kredas, ke la estonta agado de la esperantistoj en Dospat duobliĝos, ĉar ĉiuj estas junaj kaj ĉiuj posedas la flamon de Esperanto.

Gastoj de la jarkunveno estis k-do Jordanov — prezidanto de DEK en Smoljan, k-do Stojanov — direktoro de la gimnazio, kaj k-do Kaloferov — partia sekretario en la gimnazio.

La vortoj de k-do Stojanov estis bonega

esprimo de la estimo al la laboro de l' esperantistoj. Li alvokis la lernantojn obstine lerni Esperanton, ĉar tio estas necesa kaj tre utila por ili. K-do Kaloferov promesis, ke li persone lernos Esperanton kaj helpos ĉiujn E-iniciatojn.

K-do Jordanov, prezidanto de DEK en Smoljan, esprimis sian ĝojon, ke la fajrero fariĝis flamo, ke tiom multe da esperantistoj ĉeestas en la klubo. Li parolis pri la estonta kongreso de BEA en Smoljan kaj pri la gravaj taskoj plenumendaj de la esperantistoj. K-do Jordanov alvokis al obstina kaj fervora laboro. Li deklaris, ke fondo de Lernanta Grupo ĉe nia E-Societo „Fajrero“ signifas, ke ĝi estiĝas la plej granda E-societo en la tuta distrikto.

La kunveno elektis novan estraron de „Fajrero“: Emil Ĉirpanski — prezidanto, Velurina Ĉirpanska — sekretariino, Talipov — kasisto, Jordanka Pireva kaj Atanas Ŝopov — membroj.

Sekvis riĉa belarta programo. Oni kantis, recitis, ludis kaj ĝojis ĝis malfrue.

Emil Ĉirpanski

LERNANTA E-GRUPO ĈE „FAJRERO“ EN DOSPAT

Dum la jarkunveno de E-Societo „Fajrero“ en Dospat estis oficiale fondita Lernanta E-Grupo en la gimnazio. La lernantoj jam havas memstaran estraron kaj apartan agadplanon. Nur la prezidanto estas membro de l' estraro de „Fajrero“.

La novelektita estraro: prezidanto Alibajrjam



Ĉauŝev, sekretario Kadife Ĉauŝeva, kasisto Saŝo Langov, membroj K. Penĝekov kaj A. Parakozova.

La Lernanta Grupo deziras havi kontaktojn kun lernantoj-esperantistoj el la tuta mondo. Skribu al ĝia prezidanto: *Alibajrjam Ĉauŝev, la gimnazio, Dospat, Smoljansko, Bulgario.*

NOVA E-SOCIETO

En la montara urbo Svoĝe, Sofia distrikto, oni fondis Esperanto-Societon „Amikeco“. Estraro: prezidanto Aleksandr Petrov — oficisto, sekretario Elena Radenkova — bibliotekistino, kasistino Cvetana Najdenova — oficistino ĉe la fervojstacio.

X SESA NACIA STUDENTA E-KONFERENCO

La 13-an de novembro la partoprenintoj en la 6-a Nacia Studenta E-Konferenco alvenis gastaman Plovdiv, kie la Studenta E-Societo „Studenta Impeto“ kaj plej parte ties prezidantino Fani Miĥajlova faris tre bonan propagandon.

La interkona vespero okazis en restoracio „Marica“ en gaja kaj babilplena atmosfero. La oficiala parto komenciĝis la matenon de la 14-a en la ĉeesto de korespondantoj de lokaj gazetoj kaj de la japana s-ano Sasama Toŝiaki — studento el Tokio. La partoprenintoj, ĉirkaŭ 60 gestudentoj el Sofio, Plovdiv kaj Smoljan, atente aŭskultis la inaŭgurprelegon de ing. Bojidar Leonov — BEJ-sekretario kaj eksprezidanto de STELO je temo „La STELO-anaro kaj la scienco“. Leonov substrekis la gravan rolon de la studentoj en la sfero de scienco por kaj per Esperanto.

Sekvis informoj pri la 27-a TEJO-Kongreso fare de B. Batalaska — membro de la Studenta Komisiono de TEJO, kiu klarigis la bazajn taskojn de la bulgaraj studentoj-esperantistoj nun: aktiva partopreno en la junulara E-movado, en la preparlaboro de la seminario „Lingvo kaj politiko“, okazonta en Francio, bona preparo por la 28-a TEJO-Kongreso en Pollando.

Nevena Aleksieva — diplomita specialisto pri angla filologio, prelegis tre interese pri la temo „Kial nacia lingvo ne povas esti internacia. Kia lingvo povus plenumi tiun rolon“. Tre lerte de lingvistika kaj sociologia vidpunkto ŝi pruvis, ke Esperanto havas ĉiujn kvalitojn por esti vaste uzata kiel internacia lingvo de ĉiuj popoloj en la mondo.

Dum tiu ĉi konferenco unuafoje oni legis konkursreferaĵojn pri la temo de la konferenco — „La scienco kaj la studenta Esperanto-junularo“.

La konkurson partoprenis la studentoj el la Sofia Studenta E-Societo „Vela Peeva“ Stojan Atanasov — „Kiel Unesko traktas la kulturajn kaj lingvajn problemojn en la mondo“ (lige kun la 25-a datreveno de Unesko) kaj Zdravko Conev — „La scienco kaj la internacia lingvo“ — kaj la studento el la E-Societo „Studenta Impeto“ (Plovdiv) Mitko Dimitrov — „La scienco kaj la studentoj“. Ĉiuj tri temoj estis egalpremiitaj.

Ĉe la fino la japana samidano Sasama Toŝiaki parolis pri la E-movado en Japanio kaj speciale pri la studenta E-movado tie.

Post la fermo de la konferenco BEJ-estraro havis kunsidon sub la gvido de BEJ-prezidanto P. Todorov, kie oni diskutis organizajn problemojn prepare al la 38-a Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj en 1972.

Bojka Batalaska

AMIKECO INTER LATVAJ KAJ BULGARAJ ESPERANTISTOJ

La senlace agema bulgara s-ano Ĥristo Manolov, kiu gvidas Esperanto-informadon ĉe la Bazo por Teknika Evoluo en Polski Trâmbeŝ, estas kara amiko de la infana Esperanto-rondeto „Fajrero“ ĉe la elementa lernejo en Ziemeri, Latvio. Li sendas al ni bulgaran E-literaturon kaj tiamaniere konigas al ni sian belegan landon.

Hieraŭ Popola Respubliko Bulgario festis sian 25-an naskiĝdatrevenon. Jam la unuan de septembro, kiam komenciĝis en nia lando la nova lernojaro, kaj kolektiĝis nia tuta lerneja kolektivo, ni komune verkis kaj forsendis kolektive subskribitan leteron al la Bazo por Teknika Evoluo en Polski Trâmbeŝ, salutante niajn geamikojn okaze de ilia proksimiĝanta uacia festo — la Naŭa de Septembro. Post tio la unuajn du semajnojn de septembro nia

infana Esperanto-rondeto estis okupata per prepariĝo al la 25-a jubileo de via Respubliko. Ni aranĝis ekspozicion „Popola Bulgario 25-jara“, en kiu ni eksponis la Esperanto-ricevitaĵojn el Bulgario.

En tiuj tagoj el Bulgario responde al nia salutletero venis telegramo: „Dankon pro saluto okaze granda Bulgara festo saluton al tuta kolektivo vivu la paco kaj socialismo“

Direktoro *Spirov*
Esperanto-informado *Manolov*“

Ĉu vi povas imagi nian grandegan ĝojon! Cent jarojn jam ekzistas nia lernejo, ĉi aŭtune ni festos la jubileon, sed unuan fojon ĝi ricevas telegramon el eksterlando, kaj ĉi telegramo estas en Esperanto! Entuziasmigitaĵi ni atendis la 15-an de septembro.

Nia tuta lerneja kolektivo — lernantaro

kaj instruistaro — kolektiĝis en la lerneja salonego. Sub la granda lerneja standardo pendas la slogano „Popola Respubliko Bulgario 25-jara“. Apude la standoj de la ekspozicio. Sur la standoj — Esperanto-revuo „Bulgara Esperantisto“, „Nuntempa Bulgario“, „Bulgario“, „Ripozoj“, multaj E-libroj, eldonitaj en Bulgario. Speciala stando — „Sendajoj, ricevitaĵoj de la Bazo por Teknika Elovuo en Polski Trâmbeŝ“. Ĉi tie ankaŭ la telegramo de ĉi tiu entrepreno, kiu uzas en siaj internaciaj rilatoj Esperanton. La prezidantino de la lerneja Internacia Klubo Dagnija Villa malfermis la solenan kunvenon. La direktorino de la lernejo k-dino Gita Briedina parolas pri la signifado de ĉi tiu jubileo, pri la amikeco de nia lernejo kun bulgaraj E-organizaĵoj. Nia plej

bona E-lernantino Ilze Perija havas la honoron antaŭlegi la telegramon el Polski Trâmbeŝ. Mi rakontas pri nia Esperanto-amikeco kun la Bazo en Polski Trâmbeŝ, pri la multaj E-libroj kaj revuoj, kiujn ĉi entrepreno sendis por la biblioteko de nia E-rondeto „Fajrero“. La 15-a de septembro estas ankaŭ nia festo tial, ke en Bulgario, kies popolo iras la vojon de paco kaj socialismo, vivas multaj niaj amikoj-esperantistoj. Esperanto unuigas nin, donas al ni novajn fortojn por nia kunlaboro.

Arturs Kubulnieks

*vicprezidanto de la lernejo en Ziemeri kaj
gvidanto de la lerneja E-rondeto „Fajrero“*



ESPERANTO EN USSR

Ĵurnalo „Sovetskaja Molodjoĝ“, organo de CK de Lenina Komsomolo en Latvio, kiu aperas ruslingve en Riga, en sia numero 6734 de 14. XI. 1971 dediĉas al Esperanto sufiĉe grandan spacon. La rubriko estas titolita „En la lingvo de l'amikeco Esperanto“ kaj estas tre populara al la legantoj. La rubrikon preparis J. Gold, A. Mediniŝ (de latvia SSR) kaj M. Stemkovskaja, I. Rokickij kaj A. Rogov (Ukraina SSR).

Unue oni publikigas fragmenton el la materialo presita en n-ro 9/1970 de „Bulgara Esperantisto“, titolita „Esperanto en la malliberejo“ de Velko Rusinov.

Konekse kun la 50-jara datreveno de la morto de Antoni Grabowski (1921—1971), „La patro de la Esperanto-poezio“, oni publikigas mallongan informon pri lia riĉa Esperanto-agado kaj speciale pri la traduko de „Sinjcro Tadeo“ de A. Mickieviĉ.

En „Ora folio-71“ oni rakontas pri la seminario de la junaj esperantistoj de l'respublikoj ĉe Balta Maro, en kiu okazis internaciaj prelegoj pri la defendo de la naturo, pri la internacia edukado en la lernejoj de Latvio, pri la vivo kaj verkaro de la poeto-esperantisto Eroŝenko k. a.

En la kroniko oni donas mallongajn informojn pri la 56-a UK en Londono, la 12-a infana E-kongreseto, pri la eldonoj en Esperanto de diversaj libroj („Lenin kaj la revolucia movado en Latvio“, „En la frata familio de la sovetaj popoloj“, broŝuro pri Latvio) eldonitaj de la Latvia Societo pri Amikeco kaj Kulturaj ligoj kun Eksterlando; pri preparitaj novaj eldonoj; pri la kultura internacia infana centro sur insulo en Adriatika Maro.

La iniciato de la junaj esperantistoj de Latvio estas bonega. Ni elkore gratulas la iniciatintojn kaj deziras al ili novajn sukcesojn en la disvastigado de Esperanto.

I. S.

ESPERANTO-NOVAĴOJ EL UKRAINIO

En 1971 laŭ decido de Unesko en la tuta progresema mondo oni celebris la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Lesja Ukrainka — granda ukraina poetino. „Filino de Prometeo“, kiel plenrajte oni nomis ŝin.

Lige kun tiu datreveno ankaŭ la ukrainaj esperantistoj efektivigis kelkajn iniciatojn. En j. „Soveta Podolio“ (urbo Ĥmelnickij) aperis interesa artikolo de la loka esperantisto-instruisto Andrej Rogov sub titolo „Flugas en la mondo“. En ĝi la aŭtoro parolas pri

Esperantaj tradukoj de verkoj de Ukrainka, faritaj de membroj de la Esperanto-klubo en Ĥmelnickij kaj senditaj al multaj iliaj amikoj en diversaj landoj.

Ankaŭ la kieva ĵurnalo „Literatura Ukrainio“ aperigis artikolon „En ĉiuj anguletoj de la mondo“, en kiu oni parolas pri la fakto, ke verkoj de L. Ukrainka estas konatigitaj al la ekstera mondo pere de Esperanto.

Laŭ komisiono de la Ukraina E-Komisiono Andrej Rogov veturis al la naskiĝregiono de



la poetino, Volinj, kaj tie, en la vilaĝo Kolo-djaŝne, enmanigis al la direktorino de la mu-zeo de Lesja Ukrainka modestajn donacojn — du kajerojn de la presbulteno „Tra Soveta Ukrainio“ kun du dekoj da tradukoj de ŝiaj plej famaj poeziaĵoj kaj apartan volumeton de tradukoj de lirikaĵoj de la genia poetino, kiujn preparis la ĥmelnickaj esperantistoj.

Kiel eldonajo de la Ukraina Esperanto-Komisiono aparte aperis (multobligita) poemaro de L. Ukrainka en Esperanto sub titolo „Liriko“.

En urbo Ĥmelnickij dum la pasinta jaro funkciis du E-rondetoj, unu ĉe Palaco de Junpioniroj (gvidantino — Halina Zagurna, juna instruistino de franca kaj angla lingvoj en unu el la lokaj mezlernejoj) kaj dua — ĉe la urba Kulturdomo (gvidanto — Andrej Rogov). Ambaŭ rondetoj havis karakteron de unuagrada E-kursoj. Ĉe la kulturdomo funkcias ankaŭ la Esperanto-klubo.

Ĉiumonate ĥmelnickanoj eldonas tajpitajn „Poeziajn kajerojn“ dulingvajn — ili servas kiel instrumaterialo por progresintaj E-kursoj.

Ĉiumonate ĥmelnickaj esperantistoj sendas „Parolantajn leterojn“ al siaj amikoj al-urbaj kaj alilandaj. Ili partoprenas la agadon de prof. K. Kalocsay kompili „Tutmondan frazeologian vortaron“ kaj jam kolektis multajn proverbojn de diversaj popoloj (hungarajn, bulgarajn, svedajn k. a.). Ili havas ankaŭ sliparon el pli ol 450 diversaciaj anekdotoj. Adreso de la Esperanto-klubo: *Ĥmelnickij, Ukrainio, Domo de Kulturo, Esperanto-klubo, Andreo Rogov.*

Sufiĉe vigle laboras la esperantistoj en la granda ĉemara urbo Odeso. Ĉi tie funkcias du E-rondetoj kaj E-kursoj — unu en la Domo de Sciencistoj (gvidanto — N. Sigal).

En Odeso loĝas kaj laboras la eminenta esperantisto-veterano, inĝeniero-kemiisto Sergej Rubljov, kiu ĉi-jare festis sian 70-jaran jubileon. S. Rubljov, esperantisto ekde 1919, en 1921-1929 estis unu el la gvidantoj de la E-mova-

do en Odeso kaj en 1925—28 — membro de CK de la Soveta Esperantista Unuiĝo (SEU) kaj de la Lingva Komisiono de SEU. Li estas aŭtoro de la famekonata lernolibro „Esperanto-rondeto“, kiu aperis siatempe en ukraina, rusa (eldonkvanto 90 miloj), germana, franca kaj bulgara lingvoj — entute en 17 eldonoj en 5 lingvoj dum 1927—1932. Interese estas menci, ke la franca eldono estis poste malpermesita por uzado en Francio kaj la germanaj eldonoj dum la faŝista reĝimo estis forbruligitaj en lignofajroj.

Al la plumo de S. Rubljov apartenas ankaŭ vico de altnivelaj artaj kaj sciencaj tradukoj, inter ili la libroj de akademiano A. Fersman „La kemio de l'Universo“ (Leipzig, 1925), „La vojo al la scienco de l'estonto“ (Parizo, 1928), kunlaboro kaj redaktado de la traduko de fantazia romano de A. Bogdanov „Ruĝa Stelo“ (Moskvo, 1929), tradukoj de verkoj de V. Majakovskij (Leipzig, 1930), S. Jesenin — „Versoj elektitaj“ (Moskvo, 1965). Multaj gravaj verkoj de S. Rubljov troviĝas ĝis nun en manuskriptoj, ekz. „Struktura vortaro de Esperanto“, „Sistema vortaro de Esperanto“, „Laŭsona vortaro de Esperanto“. Dum la lastaj jaroj nia atestimata samideano tradukis ĉirkaŭ 600 poemojn kaj versaĵojn de la plej famaj rusaj kaj ukrainaj klasikaj kaj nuntempaj aŭtoroj. Inter ili — 120 lirikaĵoj de Aleksandr Puŝkin, lia romano „Eŭgeno Onegin“, la poemo „Kupra rajdanto“, „Malgrandaj tragedioj“ (3), „Sudaj poemoj“ (3) k. a., 60 versaĵoj de Miĥail Lermontov, 176 fabloj de Ivan Krilov, apartaj poeziaĵoj de A. Blok, F. Tjutĉev, N. Nekrasov, A. Tolstoj k. a. El ukraina literaturo — tradukoj el Lesja Ukrapavlo Tiĉina, Maksim Rilskij, Vasil Ellan k. a.

N. Andrianova

prezidantino de Esperanto-Komisiono ĉe Ukraina Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj en Kievo

Letero el Latvio

Kara redakcio!

La 16—17-an de oktobro 1971 okazis la finala konkuro pri turisma tekniko, kiun organizis la Latva Respublika Turista Klubo. Jam duan jaron la latva junulara E-rondeto „Radieto“ aktive konkuras kun turistoj de la tuta lando kaj samtempe propagandas inter ili nian karan lingvon.

La unuan tagon radietanoj — vira kaj knabina teamoj — orientadis en regiono Navessala.

Post malfacila irvojo multaj kontrolaj punktoj, kie oni devis plenumi diversajn taskojn: respondi al demandoj pri latva historio, pri turisma tekniko, nodoj k. a., la knabina teamo de „Radieto“ okupis la kvinan kaj la vira te-

amo — la trian lokon.

Rost vespermanĝo ĉiuj partoprenantoj kolektiĝis ĉe „amika lignofajro“ por koncerto: ĉiu teamo devis ion prezenti, ĉar kantoj kaj ŝercoj apartenas ankaŭ al la turisma tekniko. Sen kanto neniuj turistoj komencas la vojaĝon. Antaŭ sia programo „Radieto“ kelkvorte rakontis pri Esperanto kiel turisma lingvo kaj pri E-movado ĝenerale. Priesperantaj versoj latvalingve kaj poste kelkaj kantoj (por montri la belsonecon de Esperanto) estis ĉefaj eroj de nia koncerto. Al ĉiuj tre plaĉis ambaŭlingva ĉivespere verkita ŝerca kanto pri aventuroj dum la konkuro.

Sed dimanĉe oni devis denove pruvi sian



lertecon kaj scipovon uzi alpinisman teknikon. Oni juĝis, ĉu teamo estas kapabla aranĝi

DUA NACIA RENKONTIĜO DE RUMANAJ ESPERANTISTOJ

La Dua Nacia Renkontiĝo de Rumanaj Esperantistoj en 1972 okazis fine de aŭgusto en la pitoreska urbo Odorhej. Ĉeestis 120 esperantistoj, reprezentantoj de 10 urbaj Esperantaj grupoj.

Laŭ la raporto en Rumanio estas jam organizitaj ĉirkaŭ 500 esperantistoj kaj multaj aliaj, kiuj ankoraŭ ne anoncis sin antaŭ la landa provizora esperantista komitato. Raporton pri la stato kaj disvolvo de la Esperantomovado en la lando faris s-ano Simeon Zal. Dank' al la estraro kaj la klopodoj de s-anino Vitajoŝ Maria la renkontiĝo pasis en modela ordo kaj kun granda entuziasmo. Ĝi aprobis multajn utilajn decidojn pri la estonta agado de la esperantistoj en Rumanio.

Interalie oni emfazis la neceson aktivigi la kontaktojn kaj kunlaboradon inter la rumanaj kaj bulgaraj esperantistoj.

Stojan Kostadinov

altkvalitan memasekuradon helpe de ŝnura tekniko dum turisma marŝado tra danĝeraj glaciriveroj, dezerto aŭ montaro.

Sian rapidecon kaj precizecon montris la knabinoj, farinte ĉion tre ĝuste kaj sperte. Dank' al tio ili pruvis sian ĉampiontitolon de radiouzinaj turistoj kaj fine ekhavis la trian lokon (tuj post la latvaj ĉampioninoj — ambaŭ teamoj de l'universitato).

Viroj ankaŭ ne perdis spiritĉeeston — rekte, kuraĝe kaj ne flankigante ili iris al la venko. Nur unu ne preciza nodo malhelpis ekhavi la titolojn de latvaj ĉampionoj (mi ne rakontis ankoraŭ, ke la 11. IX. 1971 ĉiuj ok, kiuj estas sur la foto, ekhavis orajn medalojn de radiouzina konkuro pri turisma tekniko). Do, unuvorte, la ĉi-jaraj konkuroj finiĝis, kaj radietanoj ricevis bronzajn medalojn de la Latva Respubliko pri turisma tekniko.

Ni, radietanoj, penas plenumi nian decidon: enkonduki Esperanton en la turismon. La Turisma Klubo nun jam tre favore rilatas al esperantistoj.

Estime

La radietanoj

Noto de Red. Vidu la adresojn de radietanoj en la rubriko „Deziras korespondi“.

ESPERANTO EN GREKA UNIVERSITATO

La Universitato de Saloniko (Grekujo) aldonis al sia instruprogramo kurson pri la internacia Lingvo Esperanto. Laŭ la unuaj raportoj ĝi tuj fariĝis unu el la plej vizitataj kursoj en la universitato.

ESPERANTO-RENKONTIĜO EN LEIPZIG

Esperantista Renkontiĝo dum la Foiro en Leipzig (GDR) okazos la 11-an de marto 1972 en la Klubo de la Inteligentularo „Gottfried-Wilhelm-Leibnitz“ 701 Leipzig, Elsterstr. 35 je la 19,30 horo. Esperantistoj el ĉiuj landoj vizitu la Esperantistan Renkontiĝon en Leipzig

X REGULARO DE LA KORESPONDA SERVO DE TEJO

1. TEJO, celante internacian kompreniĝon, starigas korespondservon por faciligi korespondkontaktojn de la junularo.

2. Ĉiu esperantisto rajtas sendi sian korespondpeton al la Koresponda Servo de TEJO, menciante pri sekso, aĝo kaj interesiĝoj.

3. Ĉiujn korespondpetojn oni anoncos en bulteno de la Koresponda Servo, sendota al ĉiuj, kies adresojn oni publikigos.

4. Por kovri sendkostojn estas necese aldoni al la korespondpeto unu internacian respondkuponon. Aliĝontoj el landoj, kie ne vendiĝas respondkuponoj, povos sendi nestampitajn markojn je la sama valoro, kiu estas necesa por sendi leteron al Pollando.

5. Se iu volas publikigi sian adreson en kelkaj bultenoj kaj ricevi ilin, tiu devas sendi la adekvatan nombron da respondkuponoj.

6. La adreso de la Koresponda Servo estas: Koresponda Servo de TEJO, ul. Mickiewicza 6/10, Torun, Pollando.



HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

Budapeŝto, 17—23 julio 1972

sub aŭspicio de UEA

En la programo — elstaraj verkoj de la hungara klasika kaj moderna arto kaj literaturo, fakkunsidoj, vizitoj de la urbo, ekspozicioj, ekskursoj k. a.

Aliĝkotizo: 240 forintoj.

Detalan informon petu de la organizanto: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 5, poŝtfako 193.

SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO

Gyula, 10—16 julio 1972

La pasintajn 10 jarojn karakterizas altnivelaj kaj interesaj prelegoj. Inter prelegintoj: prof. d-ro Ivo Lapenna, Imre Ungar, d-ro Verner Bormann, Asen Grigorov kaj aliaj eminentuloj de la E-movado.

Antaŭtagmeze — la prelegoj, posttagmeze — ripozado sur strando, banado aŭ ekskurso tra la urbo.

Pliajn detalojn petu de: Somera Esperanto-Universitato, Gyula, 48-as u. 11.

V INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-NATURAMIKOJ en Abaliget

Agrablaj tagoj en vere internacia atmosfero, belega naturo. Ripozado, promenadoj, ekskursoj, amuzaj programoj, vizitoj en la proksima bela urbo Pecs (Peĉ).

Detalajn informojn petu de: Hungara Esperanto-Asocio, 3-a Teritoria Komitato, Pecs 1, poŝtfako 2, Hungario.

Atentu: Ĉar la supremenciitaj aranĝoj estas tute memstaraj, al ĉiu oni devas aliĝi aparte!



RENKONTIĜO EN VSETIN, ĈEĤOSLOVAKIO

De 24 ĝis 27. IX. 1971 en urbo Vsetin, Ĉeĥoslovakio, okazis renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Dum la renkontiĝo ĉeestis ĉirkaŭ 280 geesperantistoj. Krom ĉeĥoj kaj slovakoj partoprenis kelkaj esperantistoj el Hungario, Bulgario, Aŭstrio, GDR, Kanado, Francio.

La Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio havas grandan sukceson. Pli ol 3100 esperantistoj estas organizitaj kaj partoprenis en diversaj E-aranĝoj. Oni eldonis diversajn librojn kaj lernolibrojn, ankaŭ tre bonan tutmondan geografian atlason. Bone estas organizitaj radiodissendoj kaj televidaj programoj.

La ŝtataj gvidantoj favore rilatas al la E-movado.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, deziras al la esperantistoj de Ĉeĥoslovakio plensukcesan laboron en la E-movado kaj en la konstruado de la socialismo en frata Ĉeĥoslovakio.

Nikolaj Pârvanov

EN 1973 LA ESPERANTISTOJ KONGRESOS EN JUGOSLAVIO

La Universala Esperanto-Asocio anoncis ke plurmil parolantoj de la internacia lingvo el la tuta mondo kunvenos somere de 1973 en Beograd, Jugoslavio, ĉe la 58-a universala kongreso de Esperanto. Tie ili i. a. aŭskultos sciencajn prelegojn, ĉeestos teatrajn prezentojn k. a. tute en Esperanto.

KALOCSAY-KUNVENOJ EN SOFIO

La 6-an de oktobro ĉ. j. Kolomano Kalocsay — la plej granda hodiaŭ vivanta reprezentanto de la Esperanta literaturo, samtempe verkisto kaj lingvisto, fariĝis 80-jara. „Per siaj majstraj tradukoj kaj originalaj verkoj li riĉigis la Esperantan literaturon kaj donis esence novan kulturan enhavon al la Internacia Lingvo. . . Sen Kalocsay la Internacia Lingvo certe ne estus tio, kio ĝi estas hodiaŭ“ — diris pri li prof. d-ro Ivo Lapenna, la prezidanto de UEA.

Dediĉe al tiu glora datreveno la sofia Esperanto-Societo „Maksim Gorkij“ okazigis tuturban kunvenon, amase vizititan, antaŭ kiu pri la vivo kaj verkaro de Kalocsay parolis k-ino Rajna Konstantinova. En sia prelego ŝi ofte donis la parolon al la celebrato mem, citante multajn fragmentojn el liaj verkoj. K-ino Konstantinova emfazis ankaŭ la neripeteblan kunlaboradon kaj amikecon inter K. Kalocsay kaj la alia koloso de la Esp-a literaturo, kiun donis la frata hungara popolo — Julio Baghy.

La emociita kunveno decidis sendi saluttelegramon al Kalocsay en la nomo de la sofiaj esperantistoj.

Ankaŭ la Poŝtista E-Societo „Heroldo“ en Sotio organizis specialan kunvenon dediĉe al Kalocsay. Antaŭ ĝi denove parolis k-ino Konstantinova. Interesajn rememorojn pri Kalocsay rakontis k-do Asen Grigorov, kiu havis la plezuron kelkfoje renkontiĝi kun li.

K. Válev

**La CK de Bulgara Esperantista
Asocio kaj la Redakcio de „Bul-
gara Esperantisto“ tutkore dankas
al ĉiuj, kiuj gratulis ilin okaze
de la Nova Jaro, kaj bondeziras
al ili sanon, feliĉon kaj novajn
sukcesojn sur la Esperanto-kampo!**



KION FARI POR LA ESPERANTA LITERATURO

de Kolomano Kalocsay

Multe oni meditas nuntempe pri la sorto de la Esperanta literaturo; tio montras, ke por tio ekzistas kaŭzo malkontentiga. UEA eĉ estigis komisionon por la studo kaj solvo de la ĉi-rilataj problemoj; laste V. Benczik artikolis en „Hungara Vivo“ kaj provis trovi balzamon por la vundoj de la E-aj muzoj. Li skribas, ke la esperantistoj estas fieraj, eble tro fieraj pri sia literaturo.

Tamen, ĉu vere oni povas ĉi tion aserti decide? Pri kio oni estas fieraj, tion oni subtenas kaj vartas, t. e., se temas pri literaturo, oni ĝin aĉetas kaj legas. Sed la meza eldonnombro de E-aj libroj estas 1000, kaj tio ne montras tumulton da aĉetemuloj. Kaj en „Esperanto“ de UEA mi legis foje le-

teron de leganto, kiu rekte indignis pri tio, ke oni volas trudi al li la devon legi E-ajn literaturaĵojn (kaj eĉ elspezi por ili monon!); lia protesto havis la forton de tia konsterniĝo, kiun povas senti senkulpulo kondamnita je ĝismorta punlaboro. Kaj vane mi atendis — neniu lin poste kontraŭindignis. Alifoje la demando estis metita jene: kio pli necesas nuntempe, ĉu Mona Lisa aŭ pano, t. e. ĉu ni flegu la beletron aŭ ni servu al la reala vivo per teknika-sciencia literaturo. La konkludo estis, ke ni ne rezignu pri Mona Lisa, sed por kelka tempo ni ĝin pendigu iom flanke. Stranga fiero estas, kion oni pendigis iom flanke.

Sed kion ni pendigu do ĉefloke? Ĉu teknikajn-sciencajn librojn? En kiom da ekzempleroj? Ili parolas ja nur al eta parto de la esperantistaro (ĉiu faklibro al la respektivaj fakuloj), do neniel ili povos trovi eĉ frakcieton de la aĉetantaro de l'beletro, parolanta al ĉiu, almenaŭ teorie. Krome, la sciencoj pli kaj pli disfakiĝas kaj la rapidega evoluo baldaŭ arkaikigas la faklibrojn. Kiel la E-a libroeldono povus fari tiun vetkuron kun la tempo? La beletro almenaŭ estas pli malpli temporezista. Do, se ni deprenos de la ĉefloko nian „Mona Lisa“, mi timas, ke sur ĝia loko restos nur malplena muro.

Vole-nevole, ni devas rigardi la literaturon kiel ĉefan eldonotaĵon, se entute ni volas, ke io estu eldonata. Kaj ni devas tion voli, ĉar ĉesigo de libroeldono estus fatala por Esperanto. En 1895 certa sinjoro en letero skribita al „La Esperantisto“ pridubis la bezonon de la „Biblioteko“, kiu estis serio de libroj kun literatura enhavo. Zamenhof tiam respondis (O. V. p. 202 k. c.): „*Floros la Biblioteko, flo-*



ros ĉio, falos la Biblioteko, falos ĉio". Kaj li emfazis, kiel favoran efikon li spertis de sia traduko de Hamleto, kiel ĝi donis al la movado novan energion, helpis unuigi la disopiniantojn. Mi opinias, ke la Zamenhofa devizo ankaŭ nun estas valida: *Floros la literaturo, flores ĉio, falos la literaturo, falos ĉio*.

Sed kiel trovi la eblaĵojn por tiu florado?

Unue, ni devas konscii, ke la ekziston de literatura eldonado ni povas certigi nur per la konsiderinda pligrandigo de la eldonkvantoj. La nuna mizera malmult-ekzemplereco kaŭzas:

ke la libroj estas multekostaj, sekve nesufiĉe aĉetataj, sekve ne eldoneblaj pli mult-ekzemplere — tipo de „peka cirklo“;

ke la eldonejoj ne povas pagi honorarion, tial talentuloj, se ili volas vivi per sia literatura laboro, verkas, eĉ devas verki nacilingve.

Evidente, ni devas serĉi do la kaŭzojn de la mizera lingvo-debito en E-o kaj la rimedojn kontraŭ tiuj kaŭzoj. La ĉefrimedon jam nomis V. Benczik en sia artikolo: ĝi estas *organizo*. Sed liaj proponoj pri organizo ŝajnas al mi ne sufiĉe vastaj; mi nun volas starigi kiel eble vastan programon, kies plenumo koncernus ĉiujn niajn lingvajn kaj movadajn instituciojn.

Ni vidu do unuope la kaŭzojn kaj rimedojn.

1. La E-aj eldonejoj ne tre scias, kiajn legaĵojn deziras la E-a publiko. Oni devas do fari *merkatesploron tute larĝan*, do anstataŭ la 80 personoj, kiujn demandis la komisiono de UEA, demandi plurajn milojn. Tion, kompreneble, ne povus fari la komisiono mem, sed ĝi devus peti la helpon de la naciaj societoj. Ĉi tiuj, siavice, pridemandu siajn membrojn, kiujn librojn ili legus volonte en E-o. La aferon oni plifaciligus tiel, ke oni unue farus liston pri la libroj (eble 20—30—50) kaj poste oni kvazaŭ voĉdonigus la esperan-

tistojn, kiuj ankaŭ povus aldoni sian proponon. La libroliston oni povus kunmeti el titoloj, kiuj atendas la eldonon ĉe eldonejoj kaj el famaj, furoraj titoloj. Siatempe ankaŭ la eldonejo Literatura Mondo faris tian voĉdonigon inter siaj klientoj. Ĉi tiu tuta procedo havus ankaŭ la utilon, ke estiĝus kelka bruo pri la literaturo en E-ujo, kaj per tio la atento estus vekita pri ties graveco.

2. Multaj homoj volonte aĉetas libron ekvidatan en montrofenestro aŭ ŝovitan sub ilian nazon, sed estas tro komfortaj mendi la libron aŭ serĉi ĝin, post kiam ili elserĉis, kie ĝin serĉi. Jen unu el la malsan-kaŭzoj: *manko de taŭga kolportado*. Oni devas do organizi la vendadon de la libroj: en ĉiu urbo kaj en ĉiu grupo devas troviĝi „librodelegito“ aŭ „*libro-responsulo*“ okupiĝanta pri la prezentado, antaŭ-nazon-ŝovado kaj vendado de libroj E-aj. Por ke li havu por tio emon, oni devas apliki la „fenican inventaĵon“: li ricevu procentaĵon laŭ la venditaj libroj.

La manko de kolporta lerto plej bone montras, ke *la kongresoj* tute ne estas bone fruktuzataj por librovendado. Ne sufiĉas unu stando, plurfoje lokita apenaŭ troveble, sed oni devas tie la librojn propagandi per la forto de la viva voĉo, eble inter la kadroj de humura vespero aŭ danckanta festivalo aŭ elekto de belreĝino ktp. (oni ne estu tro elektemaj en la rimedoj).

3. *Mankas favora etoso por la libroj*, se ne diri, ke por la literoj entute. Mi jam aŭdis aŭ legis: „Kial mi legu novelojn aŭ poemojn en E-o, kiam ankaŭ en mia gepatra lingvo mi ne legas tiaĵojn?“ Lerta „librodelegito“ povus konvinki tian homon, ke dank' al E-o li povos do havi tiajn plezurojn, kiajn alie neniam li akirus. Emfazi la gravecon de la literaturo, veki pri ĝi intereson oni devus en la E-aj grupoj kaj gazetoj.

a) *La grupoj* ofte ne scias fari por

si programon en la klubvesperoj. Nu oni povus tie interese *konigi librojn* kaj tuj *vendi* ilin al la interesigantoj. Se temas pri poem-libro, oni povus fari prelegon pri iu poemo kun la titolo: „Kial ĝi estas bela?“ La Hungara Radio havis tian programeron tre ŝatatan kaj post ties dissendo tuj kreskis la debito de la poemlibro, entenanta la pritraktitan poemon. La naciaj societoj devus fari komisionon, eĉ konstantan komitaton el inteligentaj literatoroj, kiuj ellaborus por la grupoj interesajn programojn, tiajn, kiuj povas altiri la anojn. La plej sukcesajn el tiuj programpreskriboj oni devus interŝanĝi internacie, do fari ilin internaciaj klubvivigiloj; tiun interŝanĝon povus aranĝi la komisiono de UEA. Fine la literaturo povus ankaŭ *aktivigi* la klubanojn: ili devus deklami poemojn, reciti prozon, ludi unuaktaĵon (ekz-e de Baghy aŭ de Marjorie Boulton). Nenifaraĵ, krokodilantaj klubanoj baldaŭ ĉesas viziti la klubejon, la aktivigitaj, male, persistas. En la iama *Rondo de Baghy* la rondanoj sopire atendis la tempon de la proksima kunveno; ties sekreto estis, ke li sciis *aktivigi* la anojn.

b) La E-ajn *gazetojn* oni devus peti, ke ili okupiĝu pli multe pri la E-aj libroj. La anemiaj recenzoj, kiuj aperadas kun pedantaj riproĉoj kaj ŝablonaĵ laŭdvortoj, nemulte utilas, ĉar ili ne vekas la intereson de la leganto kaj misagordas la aŭtoron. Tiom pli, ke la kompatinda novelisto aŭ poeto devas kontenti je tiu magra nutro: plu neniam lia verkaĵo estos menciata kaj lia vivoverko mortos kune kun li. Kiu ja pritraktas la verkaĵojn de Hohlov, Emba, Adamson, Newell kaj aliaj? Oni devus fari regulon, ke la gazetoj dediĉu lokon proporcian al sia amplekso, por literaturaj studoj kaj eseoj (studetoj, eseetoj). Tio utilis ankaŭ la gazetojn mem, kiuj ne malofte estas dezerte seninteresaj.

4. Grava kaŭzo de la plorinda libro-

debito estas, ke *la nivelo de la lingvoscio* inter la esperantistoj *estas malalta*. Parte la lingv-instruistoj kulpas pri tio: ili tiom emfazas la eksterordinaran facilecon de la lingvo, ke iliaj lernantoj kredas, ke per la kurso ili jam lernis ĝin perfekte, kaj kiam ili, komencante legi, ne komprenas ion, ili seniluziiĝas kaj dezertas. Tial la plej grava tasko estas, kiel Kabe diris siatempe, ke *la esperantistoj lernu Esperanton*. Krom la perfektigaj kursoj, oni devus uzi por tio ankaŭ la grupkunvenojn, por ke ili fariĝu lingvo-lernejoj, „altaj skoloj“ de la lingvo. Por tio oni devas ellabori tiajn metodojn de lingva perfektigado, kiuj estas ne nur efikaj, sed ankaŭ *amuzaj, altirantaj la membrojn*. Mi pensas pri verkoj kiel „Paŝoj al Plena Posedo“ de W. Auld. Oni devas kunmeti similiajn por diversaj bezonoj. La grupon povas kunteni nur simpatiaj, sugestiaj, lertaj gvidantoj kaj tiaj ne kreskas en ĉiu bedo, nek en ĉiu urbo; tamen, certagrade ili estas kompanseblaj ankaŭ per malpli taŭgaj, se ĉi tiuj havas je sia dispono *bonan materialon kaj lertan metodon*: ĉi tiujn do oni devas krei kaj nacie kaj internacie. Oni povus fari en la kluboj ankaŭ komunan legaĵon de „malfacilaj“ verkoj (ekz-e: La Infana Raso, Sinjoro Tadeo, Shakespeare-, Baudelaire-, Heine-tradukoj, elektitaj originalaj poemoj ktp.) kaj klarigi komune la lokojn, kiujn ne ĉiuj komprenis. Tiel ankaŭ la kelkaj centoj da neologismoj, kiuj en la lastaj 40 jaroj „inundis“ la lingvon, ĉesus esti timigiloj; ilin lernus eĉ la recenzistoj de la gazetoj (certa recenzisto en 1969 riproĉis japanan aŭtoron pro la „invento“ de la „nova“ sufikso „eska“, kvankam ĉi tiu sufikso jam troviĝas en Suplemento de P. V., aperinta en 1953). Eble aliaj kapoj fulmos ankaŭ aliajn rimedojn por la florigo, vigligo kaj utiligo de la grupkunvenoj; estus bonege, se la kolektiva kaj eĉ internacia saĝo produktus multe pli ol mia



povra unuopa cerbo.

Multajn aliajn rimedojn oni povus, fakte, ankoraŭ trovi por la pligrandigo de la debito kaj ebligo de libroeldono. Pro spaco-manko mi sole mencias kelkajn: persvadi *publikajn bibliotekojn*, ke ili aĉetu por si ĉiujn valorajn librojn E-ajn; *akiri mecenatojn, kiuj helpus eldoni librojn multekzemplere kaj malmultekoste*; *akiri subtenon de ŝtato por eldono de reprezentaj verkoj naciaj* (ekz-e de „Brand“ de Ibsen en la brita traduko de Haugen); *varbi*

grandkapitalan entreprenon por eldono de E-aj libroj (ni pensu pri la grandega utilo, kiun siatempe „Hachette“ donis al ni per la eldono de verkoj Zamenhofaj kaj Kabeaj kaj aliaj). Ktp. ktp. — ni uzu nian kolektivan saĝon!

Kompreneble, ĉio ĉi estas nur pia deziro, se oni ĝin legos konsente, kun aprobaj kapbalancoj. Sed se ĝi povos efiki al unu aŭ kelkaj aŭ pluraj komenci ion en la direktoj montritaj, aŭ eble en direktoj aliaj kaj multe pli bonaj, tiam ĝi ne estis vane elŝvitita.

El „Hungara vivo“, n-ro 3/1971.

POR LA MALGRANDA ESPERANTISTO

ĈE LA MALJUNA BRIGADESTRO

Originala rakonto de Petro Stojanov

Estis humida suna mateno. Super la kampoj leviĝis apenaŭ videbla varmeta vaporo. Sur floroj kaj herbetoj briletis diverskoloraj perlaĵ gutoj. Ili jen eklumis, jen mallimiĝis kiel sorĉaj rubenoj.

En tiu suna mateno la junpioniroj jam laboris ĉe la bedoj de la legomĝardeno. Avo Stojĉo, la maljuna brigadestro, ofte invitis ilin atente sarki inter la legomoj por ilin ne difekti.

La junpioniroj estis jam spertaj. Ili amis la maljunan avon Stojĉo, kiu dum ripozo ĉiam rakontis al ili fabelon.

— Nu, avo Stojĉo, — aŭdigis sin la junpionirino Silva, — hodiaŭ tagmeze ni nepre volas fabelon, tial pensu jam de nun.

— Jes, nepre ni volas, avo Stojĉo, — ripetis Zlatka, amikino de Silva.

— Bone, bone, vi nur laboru bone kaj atente, — respondis avo Stojĉo.

Tagmeze post la tagmanĝo la junpioniroj ĉirkaŭis avon Stojĉo, sidiĝis sur la herbo kaj senpacience atendis la fabelon.

— Hodiaŭ vi bone laboris kaj meritas rekompencon, — diris la avo. — Do, aŭskultu mian rakonton. Antaŭ longa tempo en iu agrikultura kooperativo laboris juna kaj sipmatia agromino nomata Viĥra. Ŝi tiel multe amis la kreskaĵojn, la birdojn kaj la florojn, ke ŝi detale ellernis ĉion koncerne

ilian vivon kaj eĉ ilian lingvon, kiu estis mirinde dolĉa. Jes, vi povas ne kredi, tamen tio estis vera. Ŝi parolis kun ili, aŭdis iliajn sonojn, susurojn kaj ilian spiradon. Kiel ŝi sukcesis atingi tion, ankaŭ mi ne scias.

Diris al mi iu kooperativano, ke ŝi posedis ian etan aparaton. Sidante sur seĝeto apud la bedoj de papriko, tomatoj aŭ aliaj legomoj, ŝi metis la aparaton ĉe sian orelon kaj karesante ilin demandis:

— Nu, kiel vi fartas, miaj karaj kaj delikataj trunketoj?

— Mi bone fartas, — respondis la plej proksima, — jen kiel bone kaj humide estas ĉirkaŭ mi; ne estas herbaĉoj, bone mi estas prikulturita, nede longe oni nutris nin per diversaj saloj kaj sterkoj. Nun mi disvolviĝas bone kaj baldaŭ mi donos belajn kaj sukoricaĵajn kapsikojn.

— Mi tamen male, — aŭdigis sin alia. — Mi ne fartas bone. Hieraŭ brigadaninoj ĉirkaŭfosante min fortranĉis kelkajn radiketojn kaj nun mi ne povas bone nutriĝi.

— Al mi oni subfosis la tutan radikaron, kaj nun mi sentas, ke mi velkas, — diris alia.

— Estu trankvilaj, miaj karaj trunketoj, — diris Viĥra. — Tuj mi helpos

vin. — Kaj ŝi rektigis la trunketojn, rebutis kaj karesis ilin.

— Sub mia radiko trapasis talpo kaj faris kanalon. Miaj radikoj ne povas jam min nutri, ĉar ili pendas en la truo, — aŭdigis sin najbara trunketo.

— Ah, mia kareta, kiel vi suferas — respondis Viĥra. Kaj ŝi tuj piedpremis la grundon, rektigis la trunkon, karesis la folietojn, akvumis ĝin per la akvoversilo kaj ree streĉis la orelojn aliloken, kie petis aliaj.

— Iu vermo min mordas, kaj mi ne vivos longe, — plendis alia trunketo.

— Ha, atendu, mi tuj malkovros tiun malbonfaranton, — diris Viĥra. Kaj ŝi trafosis atente la grundon ĉirkaŭ la trunketo kaj malkovris dikan grizan vermon.

— Jen la sabotanto, tuj mi ĝin punos, — diris ŝi. Kaj en la sama momento ŝi alvokis flugantan pegon, kiu englutis la vermon kaj demandis, ĉu ne estas ankoraŭ aliaj.

— Tion ĉi meritas tiu griza parazito kaj malbonfarulo, — aldonis iu najbareto.

Tiel Viĥra vizitadis tomatojn, braskojn, kukumojn, iris al la tritiko, sed plej multe restis ĉe la fruktarbetoj, kie diversaj vermoj kaj raŭpoj mordadis la foliojn kaj la fruktoj.

Pri ĉio ĉi ŝi notis en notlibreto kaj prelegis antaŭ la kooperativoj.

Kiam ŝi trapasadis la kampojn, la floroj danke klinis siajn kapetojn kaj eligis pli da aromo dirante:

— Jen nia panjo venas, ŝi ne diŝiras nin, ŝi nur karesas kaj protektas nin kontraŭ malamikoj. Kiel bona ŝi estas kaj, mirige, kiel ŝi komprenas nian lingvon!

Foje sur la ŝultro de Viĥra sidiĝis abelete. Ŝi prenis ĝin atente sur la mano, diris ion al ĝi, levis sian manon kaj la abelete forflugis al sia domo ŝargita de poleno.

Post tio multkolora pego sidiĝis sur ŝian ŝultron.

— Ah, mia kara belulo, — diris Vinra, — mi vokis vin, ĉu vi scias pri

kio? Tie en la ŝeloj de pli maljunaj pomarboj estas vermoj. Estu bona, komencu laboron kun viaj amikoj, kaj purigu la arbojn.

— Ĉif, ĉif, ĉif! Bone, nia kara mastrino. Ni faros ĉion, kio estas laŭ niaj fortoj.

Ŝi karesis la belulon kaj liberigis ĝin por flugi al la fruktĝardeno.

Tiel dank' al tiu neordinara agronomino kaj dank' al la atentemaj kaj disciplinitaj kooperativanoj la kooperativa mastrumo estis unu el la unuaj en la lando. Ĝi ricevis eĉ plej altan premion de nia ŝtato.

— Nu, karaj infanoj, por nun sufiĉas, — diris fine avo Stojĉo. — Ripozu bone, ĉar atendas nin laboro en la ĝardeno.

PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO EN ZAGREB

Ĉi-jare kutime en Zagreb (Jugoslavio) de la 1 ĝis la 7 de oktobro okazis la IV Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). Ĝin partoprenis pupteatroj el: Rumanio (Ploești), Pollando (Łódź kaj Varsovio), Hungario (Budapeŝto), Jugoslavio (Zagreb) kaj Bulgario (Ruse).

Funkciis du ĵurioj: el aĝaj specialistoj pri la lingvo (ĉiuj prezentaĵoj estis en Esperanto) kaj el infanoj. La infana ĵurio konsistis el 5 geknaboj el Italio, Hungario, Jugoslavio kaj Bulgario (el nia lando mi havis la feliĉon).

La infanoj sincere aljuĝis la unuan premion al „Neĝa reĝino“, prezentita de la bulgara pupteatro el urbo Ruse, sed la ĵurio el plenaĝuloj korektis tiun ĉi decidon kaj la lasta klasifiko estis:

I premio: „Hefesto“ (Pollando);

II premio: „Mistero en anasejo“ (Hungario);

III premio: „Neĝa reĝino“ (Bulgario).

La bulgara pupteatro prezentis sin tre bone. Oni montris ĝin ankaŭ per la Zagreba Televido. Mi kredas, ke ĝin atendas grandaj sukcesoj estonte.

Gorĝeta Zdraveva

ABONO AL „BULGARA ESPERANTISTO“ ANKORAŬ EBLA!

*Se via konata esperantisto ne sukcesis ĝustatempe aboni nian revuon, petu lin sendi tuj la abonkotizon al nia asocia kancelario:
bul. Hristo Botev 97, Sofio*



LINGVAJ DEMANDOJ

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO

La Akademio, post zorga esploro de la demando, oficialigis jenan regulon pri la uzo de la refleksiva pronomo-adjektivo. Ĝi esperas per tio pozitive kontribui al pli granda unueco de la uzado.

Regulo

I. La refleksivaj pronomoj (serio *si/sia*) rilatas nur la 3-an personon kaj resendas al la plej proksima subjekto, aŭ singulara aŭ plurala. Tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo, ĉar novan subjekton povas enkonduki (1) infinitivo, (2) a-linaĵa participo kaj (3) substantivo de verba deveno, kiam ĝi klare esprimas agon.

II. Foje la vera subjekto lasas sin vidi per enmeto de la vortoj „*kiu(j)* est-“. *ekz.* apozicioj adjektivaj aŭ substantivaj provizitaj per komplemento (*ekz. kastelo fama pro sia historio; sed li ekvidis sian fraton Benjaminon, la filon de lia patrino = B., kiu estis la filo de. . .*).

III. Ekzistas tradicie sankciitaj vortkunmetoj kaj frazeroj, en kiuj la refleksivo funkcias absolute, sen rilato al la agsubjekto: *ekz. siatempe ktp.*

IV. Nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata.

Tiun regulon valorigas jena ekzemplaro.

Gvidaj ekzemploj

I. Vi lavas vin kaj li lavas sin.

Ĉiuj homoj akiras por si.

Ŝi estas amata pro si, ne pro la doto.

Ŝia propra patrino forpelas ŝin de si.

Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli ol sin mem.

Mia patrino plendas, ke ŝiaj filinoj faras ĉion por si, nenion por ŝi.

Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro.

La infanoj serĉis sian patrinon.

Ŝi estas amata de siaj instruistinoj.

Li promenis kun sia edzino; li kaj lia edzino promenis.

Ili kondukis la kolegojn en sian loĝejon anstataŭ iri kun ili en la ilian.

La patrino diris, ke ŝia filino venos kun sia infano.

(1) La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin por la ceremonio.

La sinjoro ordonis al la servisto vesti sin pli dece.

La mizero kutimigis lin levi sin el la lito tre frue.

Jozefo ordonis al siaj servistoj balzami lian patron.

Li invitis la pentriston alporti unu el siaj pentraĵoj.

La reĝo, konsultinte kun la ĉefministro, sendis voki sian kuraciston.

(2) Ŝi ekvidis viron staranta antaŭ ŝi.

Ŝi ekvidis starantan viron antaŭ si.

Li sidigis sur la seĝo prezentita al li.

Li portis seĝeton refalditan sur si mem.

Li estos kiel arbo donanta sian frukton en sia tempo.

Li rekompencis la soldatojn batalantajn por lia savo.

La juĝisto opiniis la atestanton influata de siaj antaŭjuĝoj.

Ŝi zorge observis la enportadon de siaj kofroj.

(3) Marta admiris lian fidon al ŝi (Marta).

Marta admiris lian fidon al si.

Ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj.

Ŝi ribelis kontraŭ la interveno de la edzo en ŝiajn aferojn.

II. Li evitu la trinkaĵojn por li tro acidajn.

Ĉiu konas homojn nur por si indulgajn. Picasso vizitis muzeon, faman pro liaj pentraĵoj.

Ili vizitis la muzeon, faman pro siaj pentraĵoj.

III. Moki ies fidon al si mem.

Oni komprenis liajn gestojn per si mem.

Ni ne povas koni la realon en si mem.

Metu ĉion en sian lokon.

En ĉiu kranio estas sia opinio.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÂLEV

Redakta Komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Venelin MITEV, Stefka ĤRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Silva Evgenieva — *Sofio* 2, str. Budapeŝta 33 (studentino de orientalismo — kun ĉel pri lingvoj, literaturo, bk.).

Se vi deziras kontaktojn kun bulgaraj studentoj, kiuj lernas Esp-ton en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski, skribu al ilia lektoro: Kunčo Vălev — *Sofio* 27, Str. Ĉatalğa 5.

20 junaj geesperantistoj-konstruktoroj, inĝenieroj k. a. akurate korespondus tutmonde pri ĉt. Skribu al: BTR (Esperanto) Polski Trâmbeŝ distr. Veliko Târnovo.

Hungario

Gestudentoj-esperantistoj, dezirantaj korespondi, kolekti kaj interŝanĝi materialojn pri la temoj esperantologio, interlingvistiko kaj ĝenerala lingvistiko skribu al: Scienca Rondo Studenta, Universitato ELTE, *Budapest* V., Pesti B. u. 1—3.

D-ro I. Szerdahelyi sciigas, ke lia antaŭa adreso (BP., VIII, Szigetvari u. 22) ne plu validas. Li petas la sendaĵojn ĉesi al lia ofica adreso: Universitato ELTE, katedro pri ĝenerala kaj aplika lingvistiko, *Budapest* V., Pesti B. u. 1—3.

Japanio

S-ro Ooya Shin — Fuyoso, 2-28-17, Kitakata, Ichikava, Chiba (21-jara — pri bk, pm, fotoj k. a. kun bulgaroj).

Pollando

Zaremba Halina — *Szczecine*, str. Waska 4-b/11 (16-jara — lingvoj, geografio, sporto, muziko).

Dziarnowski Waldemar — *Inowroclaw*, str. Swierczewskiego 14/14 (turismo, pm, bk, moneroj).

Alojzy Gorętkowski — *Wroclaw*, str. Gen. Pradzyńskiego 1-a/16 (25-jara laboristo — kun ĉel pri ĉt, precipe pri amatora moderna teatro).

Hiacek Augustin — PTR-Werynia, pow. Kolbuszowa, woj. Rzeszów (20-jara studento — pri kulturo, filmo, turismo, bk. gramofondiskoj).

Janusz Kabala — PTR-Werynia, pow. Kolbuszowa, woj. Rzeszów (19-jara studento — pri kulturo, turismo, bk, filmo, literaturo, gr. diskaj — en Esp-o, rusa, germana, pola).

Bożena Pielat — *Zyrardów*, str. Swierczewskiego 32 m 27 (fraŭlino — kun gebulgaroj).

Elżbieta Drabik, *Zyrardów*, str. Rewolucji Październikowej 24/18 (fraŭlino — kun gebulgaroj, kolektas bk, fotojn de aktoroj k. a.).

Halina Salwa — *Wroclaw* 28, str. Pionierska 41 (20-jara — kun ĉel pri moderna muziko).

Szot Władysław — *Werynia* PTR, pow. Kolbuszowa, woj. Rzeszów (20-jara studento — pri kulturo, turismo, filmo, bk, gr. diskaj).

Kaminska Krystyna — *Budy Wolskie*, poczta Łajszczew Stary, powiat. Skierniewice (fraŭlino — bk, gr. diskaj k. a.).

Mieczysław Porowski — *Opole*, ul. Dąbowa 133, m. 15 (25-jara oficisto — sporto, turismo, muziko, lit-ro, moderna muziko, teatro, bk, pm, gr. diskaj).

Sovetunio

En 1972 ni festos du jubileojn — de nia junpionira organizaĵo kaj de USSR. Ni invitas E-gastojn el eksterlando en nian mezlernejon. Skribu al ni: USSR, Doneckaja obl. 343 871, *Avdeevka* 3, sŝ 6, klubo, „Druĵba“.

Ahlakov M. — DASSR, *Maŭaĉkala* str. Sovetskaja d. 20, kv. 40 (19-jara studento en ŝipkonstrua instituto — pri vivo de studentoj kaj junularo, muziko, poezio, sporto, turismo, gr. diskaj, pm).

E. Grigonienis — *Vilnius* 31, Ĉiurlionio 35—13, Litovio.

La Klubo de Internacia Amikeco ĉe Ĥmelnicka Teknologa Instituto dez. korespondi kun studentoj kaj junaj lektoroj el institutoj kaj universitatoj de tuta mondo pri studenta vivo, junulara movado, pri problemoj de scienco, tekniko kaj kulturo.

Interŝanĝo diversflanka. Lingvoj: pola, rusa, angla, germana, franca, Esperanto. Adreso: USSR, *Ĥmelnickij*, str. Frunze III, ĤTIBO, KID.

Gelernantoj 13—16-jaraj deziras korespondi kun bulgaraj gelernantoj-esperantistoj. Celo: konatiĝi kaj efektiviĝi reciprokajn vizitojn. Skribu al: USSR, 344 058 *Rostov-Don*, 2-a Krasnodarskaja 68, Ŝkola 37, Klubo de Internacia Amikeco „Esperanto“.

Esperantistoj-turistoj el Latvio (vidu paĝon 10) deziras korespondi kun ĉel pri ĉt:

Anita Sele, Tadaiku 8—5, *Riga*, Latvio.

Janis Kalnins — Instituta 4—3, *Jelgava*, Latvio.

Sandra Repša — Valdeku 15—68, *Riga*, Latvio.

Karlīs Krievins — Vekumnieku 9, *Riga*, Latvio.

Ingrīda Tizenberga — Kekavas 11/2—11, *Riga*, Latvio.

Zigis Polaks — Strautu 59, *Riga* 35, Latvio.

Astra Lauka — Ogres regiono P/N Mengele, „Vegeni“, Latvio.

Aristids Medinš — Ed. Smilga 34—5, *Riga-2*, Latvio.

Inara Medina — Ed. Smilga 34—5, *Riga-2*, Latvio.

